

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- La pasintan semajnon ni vidis, ke en frontartikolo titolita **Grava momento** Hector Hodler anoncis al la legantoj de *Esperanto*, ke la Komitato de la Delegitaro decidis pri la neceso reformi esperanton. Pri tiu reformo mem li nenion diris. Li nur alvokis la esperantistojn ne facilanime trudi ŝanĝojn en esperanton, kiuj rompus la unuecon, kiu estas bazita sur libere kaj komune akceptita Fundamento. Li sin diris preta akcepti la decidojn, ne de la Delegitaro, sed de la Lingva Komitato, la tiama esperanta akademio.

Cl.- La momento vere estis grava. La krizo komenciĝis dum la tria Universala Kongreso en Kembrigo en somero 1907. Tie Louis Couturat disdonis 80-paĝan broŝuron, kiu estis titolita : *Etude sur la dérivation en espéranto [Studo pri la derivado en Esperanto]*. Tiu verketo estis dediĉita al la kunvenonta **Komitato de la Delegitaro por la alprenado de lingvo internacia**.

A.- Kiu estis tiu Louis Couturat ?

Cl.- Louis Couturat estis famiĝinta en la franclingvaj universitataj medioj pro siaj valoregaj verkoj pri matematiko, filozofio kaj lingvistiko.

A.- Li estis aŭtoro multlegata, kaj pro tio ege influpova. Pro tio lia provo starigi **Delegitaron por la alprenado de lingvo internacia** rapide ricevis la apogon de multaj sciencistoj.

Cl.- Louis Couturat ne longe instruis, ĉar li estis finance sendependa. Li ĉefe verkis bonege dokumentitajn eseojn, kiel ekzemple la sescentpaĝan *Histoire de la langue universelle [Historio pri la Lingvo universala]*, la unua nacilingva verko pri la temo arta lingvo, kiu estis atentata de la publiko.

A.- Kiel profesoro li anstataŭis la filozofon Henri Bergson en la pariza universitato **Collège de France**.

Cl.- Liaj ĉefaj verkoj aperintaj antaŭ 1907 estis :

A.- *De l'Infini mathématique [Pri la matematika Infinito]* : 700-paĝa traktato, 1896.

Cl.- *De Platonis Mythis [Pri la platonaj mitoj]* : cent-paĝa eseo pri la platona penso, ankaŭ en 1896.

A.- *La Logique de Leibniz [La Logiko de Leibniz]* : 600-paĝa eseo pri la filozofio kaj verkaro de Leibniz, 1901.

Cl.- *Opuscles et fragments inédits de Leibniz [Nekonataj verketoj kaj teksteroj de Leibniz]* : 700-paĝa dokumentaro, kiu lin mondfamigis, 1903.

A.- Lia libro pri la internaciaj lingvoj aperis la saman jaron.

Cl.- Dekoj da gravegaj artikoloj pri temoj filozofiaj, psikologiaj, historiaj, artaj, sciencaj, matematikaj kaj lingvaj turnis al li la atenton de la legantaro de la ĉefaj franclingvaj revuoj.

A.- Do, kiam en 1907, ĵus antaŭ la kunsido de la Komitato de la Delegitaro, Louis Couturat aperigas broŝuron, kiu kritikis la esperantan derivadon kaj proponas reformon de la lingvo de Zamenhof, almenaŭ en la franclingva universitata publiko, liaj asertoj estos legataj.

Cl.- Politike la eldono de tiu broŝuro en tiu momento estas lerta taktiko, kiun Louis Couturat volas profiti por trudi al la Komitatanoj de la Delegitaro sian personan vidpunkton.

Hector Hodler, 15-a parto : Louis Couturat kaj René de Saussure
Claude Gacond, 358-a radioprelego, 1970.08.19 & 22

A.- En Kembriĝo tiu verketo similas al fulmotondro en blua ĉielo. Kaj la tempo mankos antaŭ la kunsido de la delegitara Komitato por rebati tiun argumentadon, kiu sin prezentas sub la signo de la logiko.

Cl.- Plie tiu argumentado estas unuflanke sufiĉe nova kaj neatendita por la esperantistaro. Aliflanke ĝi profitas pri tiamaj nesolvitaj demandoj por pruvi la nelogikecon de esperanto. Tial la esperanto-gvidantoj ne kapablos tuj respondi.

A.- La definitivan respondon donos René de Saussure, ĝeneva profesoro, en 1910 en la revuo *Svisa Espero*. Li proponos 500 tiamajn svisajn frankojn, proksimume kvin mil hodiaŭajn frankojn, al Louis Couturat aŭ al la aliaj adeptoj de la lingvo de la Delegitaro, se ili povos rebati lian argumentadon. Neniam tiu sumo estos depostulita de rebatanto, kaj kelkajn jarojn poste Louis Couturat mem devos agnoski, almenaŭ parte, la pravecon de René de Saussure, kaj tio en la revuo *Progreso*, kiun li redaktadis. Pri tio ni raportos en taŭga momento.

Cl.- Hector Hodler kaj René de Saussure, en tiu epoko 1907-1910 sin ofte renkontis. Ambaŭ loĝis en Ĝenevo kaj ambaŭ celadis la tujan uzadon de esperanto. Tuj post la ĝeneva kongreso en 1906 René de Saussure malfermis je la strato Bovy-Lysberg esperanto-oficejon unue propagandan, baldaŭ poste sciencan.

A.- La unua sekretario de tiu oficejo subvenciata de René de Saussure estis la juna Hector Hodler.

Cl.- Kiam Hector Hodler transprenis la redaktadon de la gazeto *Esperanto*, René de Saussure lin finance helpis por aĉeti la titolrajton al Paul Berthelot kaj por kovri parton de la deficito dum la unuaj jaroj.

A.- Estas ankaŭ René de Saussure, kiu trovis kaj luprenis la loĝejon en la strato Bourse 10 en aŭtuno 1909, do du jarojn post la Delegitara afero, kiam Universala Esperanto-Asocio bezonos oficejon.

Cl.- Tutcerte pri la erariga argumentado de Louis Couturat multe interdiskutis René de Saussure kun Hector Hodler. Ambaŭ sentis la bezonon trovi taŭgan kontraŭ-argumentadon nerebateblan. Dum René de Saussure esploras la gramatikan kaj vortfaradan flankojn, Hector Hodler pli kaj pli interesiĝos al la ideologia kaj primovada originaleco de esperanto. Ilia laboro estis komplementa, kaj en la unuaj jaroj interdependa.

A.- Post tiuj ĝeneralajoj ni iom atente ekzamenos la trompigan argumentadon de Louis Couturat, kaj vi tuj komprenos, kial ĝi estis tiom danĝera kaj kondukis al la Ido-skismo. Tion ni faros la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-